Wilhelm Müller,

Migrado

tradukita de Friedrich Pillath

Migrado, mia korplezur'
Migrado!
Sopiras bona muelist'
Migradon ĉiam kun persist',
Migradon!

La akvo ja instruis nin,
Migradi!
Sen ĉes' antaŭen kuras ĝi,
Migradon celas kun pasi',
Migradon!

Modela estas por migrul'
La rado!
Ĝi turnas sin kun gaja bru',
Ne pensas pri haltado plu,
La rado!

La ŝtonoj eĉ kun sia pez',
La ŝtonoj!
Moviĝas ronde kun penad',
Por kuri vete kun la rad',
La ŝtonoj!

...

Migrado, mia korplezur',
Migrado!
Adiaŭ majstro kaj majstrin',
Jam sen kolero lasu min,
Migradi!

Traduko de la Germana poemo "Wanderschaft" de Wilhelm Müller *(∗1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de* Friedrich Pillath *(†1932-04.03).*

Arg-605-1218 (2012-10-04 18:59:30)

Verkita de la poeto Vilhelmo Mulero (Wilhelm Müller, 07.10.1794 - 01.10.1827). Esperantigis: Friedrich Pillath (= Zanoni), † 03.04.1932, laŭ la origina germanalingva teksto. La tekston de tiu ĉi kanto-traduko mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kant-libro "Junularo kantas", kompilita de Germana Esperanto-Junularo en 1953-01-12 (subskribis: Franz Josef Scholz), eldonejo: Limburger Vereinsdruckerei. [Laŭ informo de la Viena Esperanto-Muzeo, s-ro Christian Cimpa, „Zanoni" estis la pseŭdonimo de Friedrich Pillath. Pri tiu vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`*.]*